

Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, MARTO 2009, JARKOLEKTO 27
Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019

esperantobob@iprimus.com.au

Legeblas ankaŭ surrete: www.gazetejo.org

Petante bonan konsilon, li diris al sia kamarado, ke urĝe necesas, ke li seniĝu de sia edzino.

"Vi aĉetu al ŝi malnovan, rustiĝintan 'Volkswagen' kun eluzitaj pneŭoj", diris la kamarado. Baldaŭ ŝi kuŝos en la tombejo!"

Kelkajn tagojn poste ili rerenkontiĝis. Demandis la kamarado: "Nu, ĉu vi sukcesis per la 'Volkswagen'?"

"Ne, tre malbone. Ĉiun vesperon ŝi hejmen venas nevundita. Kion en la mondo mi devas fari?"

"Nu, aĉetu al ŝi pezan, usonan aŭtaĉon!"

"Post kelkaj tagoj ili refoje rerenkontiĝis: "Nu, demandis la kamarado, ĉu vi sukcesis?"

"Ne, bedaŭrinde ne", ŝi estas tro bona raliŝoforo, ŝi venas hejmen ĉiun vesperon pli kaj pli frue!"

"Do, restas nur unu afero farenda", diris la kamarado, "necesas, ke vi al ŝi havigu 'Jagaron'!"

Pasis kelkaj semajnoj, kaj la du kamaradoj refoje rerenkontiĝis sur la strato.

"Nu, ĉu vi sukcesis per la 'Jagaro'?"


"Jes, eĉ tre facile. Ŝi estas for por ĉiam!"

"Bone, eĉ bonege. Kio okazis?"

"Nu, iun malfruan vesperon mi malfermis la enirejon al ĝia kaĝo, kaj tuj... GRRR..."

Mummy, why can't we all speak the same language"

La bona libro
can't we all speak the
verkita de Nicole Else,
Highway, Asquith NSW
Nicole@cryogenic.net jam



"Mummy, why
same language?"
1/359 Pacific
2077, retadreso
da sukceso, ke ĵus

aperis la tria eldono. La verko aĉeteblas rekte de la verkinto kontraŭ \$ 6,95 plus afranko \$ 1,95. Ĝi estas angle verkita kaj celas ĉefe infanojn proksimume 10-jarajn.

Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senpene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, pli ol nur unu fojon, “Lingvaj Resondoj”, la elstaran verkon de nia eminenta Marcelo Leereveld. Lian verkon mendu ĉe 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur \$ 23,00!

“Pardonu min, karulo, ĉu mi estas tro malfrua por nia rendevuo?”

”Ne, ne, kaj la dato kaj la monato ĝustas!”

Gravaj Esperanto-eventoj:

Merkredon la 4an de marto ni renkontiĝos en Clarence Park je la 18a horo.

Vendredon la 13an de marto ni, je la 19a horo, renkontiĝos ĉe Indrani por pridiskuti pri la AEA-Kongreso en 2011, kiel ankaŭ pri la jam tradiciaj kaj popularaj ekskursoj kaj renkontiĝoj de ”Esperanto en Sudaŭstralio”.

En marto ni prenos parton en la kajtofestivalo kaj boatekskurso en Adelajdhaveno.

En aprilo ni ekskursetos al Carrick Hill, 46 Carrick Hill Drive, Springfield, S.A. 5062.

En aprilo ni teatrumos ĉe Pat.

En majo ni vizitos la mangloarbaron en Sankta Kilda.

La 94a Universala Esperanto-Kongreso okazos de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2009 en la belega urbo Bjalistoko, Polujo.

La jam populara kantofesto ĉe Indrani okazos ĉijare en oktobro.

En 2010 la Universala Esperanto-Kongreso okazos refoje en la belega urbo Havano, Kubao.

”Mia edzo kaj mi neniam kverelas pri mono. La malmulto, kiun li enspezas, certe ne estas kverelinda!”

Sudaŭstralianoj en Sidnejo

Raporto de Katja Steele

La 24a Aŭstralio Esperanto-Somerkursaro ĉijare okazis en Sidnejo inter la 11a kaj 24a de januaro. Inter ĝiaj

proksimume 80
el Adelajdo: Max
Horvath, Trevor
Pat Palmer.



partoprenantoj estis kvar
Wearing, Sandor
Steele, Katja Steele kaj

Sandor instruis
studantoj utiligante
Kolker: "Vojaĝo en Esperantolando". Trevor legis kun siaj
kursanoj "La ŝtona urbo" de Anna Löwenstein kaj duonan
de sia tempo li dediĉis al klarigo de la historiaj
cirkonstancoj, al



Tute
Sandor instruis
kelkaj koreaj
samloke studis la

la 3an nivelon al
la verkon de Boris
kiuj la libro rilatas.
eksterprograme
Esperanton ankaŭ al
instruistoj, kiuj
anglan. Li tiom

sukcesis, ke du junaj koreinoj kuraĝis prezenti Esperanto-
dialogon antaŭ la tuta ĉeestantaro de nia kursaro. Uzante
siajn jamajn koreajn kontaktojn Sandor prizorgis ankaŭ
intervjuiĝon de alia interesulo pri Esperanto: gvidanto de la
korea grupo. Intervjuis lin la koreaj samideanoj en Koreujo
mem. Laŭ la instigo de Sandor la Esperanto-instruistoj petis
siajn lernantojn skribi pri siaj kursaraj spertoj, el kiuj
Sandor kompilis interesan opinifolion. Dum la nacia vespero
ĉiu ĝuis la bildojn kaj prelegojn de Sandor pri la nacia
parko Kakadu kaj en la lasta vespero la klasprezenton de la
kanto "Dek klubanoj...".

Trevor ofte rolis dum la Somerkursaro kiel
laŭtparolilo,
informojn en la
Dum la festmanĝado
kaj la aŭkcianto.



kune kun siaj kursanoj kanton verkitan de li mem kun la
temo de liaj prelegoj: romianoj. Li havis nur unu
posttagmezan
ekzamenis du
AEA-ekzamenoj kaj
al unu el ili la
Kiel jam kutime,



anoncanta la aktualajn
bruplena manĝejo.
li estis la ceremoniestro
Krome li prezentis
tradukekzercon, sed
kandidatojn pri la
poste aparte instruis
mankantajn sciojn.
Trevor estis ankaŭ ĉi

foje la organizanto de la ekumena diservo.

La ĉefa tasko de Katja estis gvidi la libroservon de la kursaro. Ŝi iniciatis kaj gvidis la kunsidon pri la klubaj aktivaĵoj en Aŭstralio kaj Novzelando, kaj prelegis pri la aŭstraliaj verkistoj.



En 2011 estos la 100a datreveno de la 1a Aŭstralia Kongreso. Kadre de niaj klubaj kunvenoj ni jam esprimis nian deziron okazigi la tiujaran Somerkursaron en Adelajdo. En Sidnejo ni diskutis la programojn de la Novzelanda, Novkaledonia kaj Aŭstralia Esperanto-asocioj kaj evidentiĝis, ke la loko de la venontaj kvar somerkursaroj estas jam fiksita: Sidnejo. Post la interkonsiliĝo kun la aliaj ĉeestantoj ni publike anoncis, ke en 2011 ni okazigos la kongreson de AEA en Adelajdo.

”Ĉu vi scias, ke estas vermoj en iuj specoj de fromaĝo”.

”Jes, tion mi aŭdis”.

”Bona Dio, via aŭdkapablo estas ja bonega.”

Merkredon la 4an de februaro kondukis kunvenon Sandor pri la organizado de la AEA-Kongreso en Adelajdo en 2011. Provizore ni elektis la datojn 3a ĝis 9a de julio, sed tio dependas kompreneble de la havebleco de ĉambroj en la kolegio, kiun ni elektos. Margaret Furness provos eltrovi ĉu entute haveblos ĉambroj en julio.

Estis proponita Esperanto-filmfestivalo dum la kongreso. Sandor mem esploros pri la kinejhavebleco.

Cetere venis propono, ke la Jarkunveno okazu, kiel antaŭe kaj tradicie, kelkajn tagojn antaŭ la fino de la Somerkursaro. Evidente estas tro malfacile por la plej multaj membroj preni parton en ambaŭ aranĝoj. Tio estas facile komprenebla, ĉu ne? Tiuj, kiuj jam pagis proksimume \$2.000,00 por la Somerkursaro ne pretas refoje pagi \$2.000,00 por iri kaj pasigi nur 1, 2 aŭ 3 tagojn en Tasmanio. Neniu el ni estas milionuloj, kaj certe ne mi !

Okazos eksterordinara kunveno vendredon la 13an de marto, je la 19a horo, pri tiaj aferoj kiel ankaŭ pri niaj tradiciaj ekskursoj kaj popularaj renkontiĝoj, ĉe Indrani .

Enmalsanulejiĝis s-ro Rudd. Konsiderante liajn drinkadkutimojn la kuracistoj opiniis, ke lia hepato malsanas. Sed montriĝis, ke ne la hepato, sed la cekumo estas malsana. Oni do fortranĉis ĝin. Vekiĝinte s-ro Rudd demandis la flegistinon:

“Diru al mi, kion vi faris al mia cekumo?”

”La kuracisto enmetis ĝin en alkoholon.”

”Bone, eĉ bonege”, diris s-ro Rudd, ”ĝi jam alkitimiĝis al tio!”

Reago al artikolo februara

Kun intereso mi legis la artikolon de Zlatko Tišljar, ”La teorio de Zamenhof kontraŭdiras sin mem”. S-ro aŭ sino Tišljar parolas pri la kontraŭdiro ekzistanta inter Esperanto kiel lingvo por la tuta homaro kaj Esperanto kiel lingvo por popolo, t.e. por grupo, kies identecon ĝi markas.

Mi estas usonano; dum jaroj mi pli kaj pli bone komprenis la problemon inter la angla kaj aliaj lingvoj. Eble mia intima rilato kun la angla iom tordas mian komprenon, sed mia ideo estas, ke ne ekzistas kontraŭdiro inter la koncepto de Esperanto kiel ”lingvo por la tuta mondo” kaj Esperanto kiel lingvo de specifa popolo”.

Mi povas uzi travivaĵon el mia propra vivo por klarigi mian deklaron. Mi parolas tri lingvojn: la anglan, la hispanan kaj Esperanton. La angla estas mia denaska lingvo, kaj tial ĝi estas por mi kiel neniu alia lingvo; la hispana estis en mia vivo valora kaj agrabla ilo profesia; Esperanto estas la lingvo, en kiu estas kaj kreskas ero de mia koro.

Mi kredas ke tia situacio ne estas malofta inter esperantistoj: ĉiuj lernas la denaskan lingvon, memkompreneble, kaj ofte lernas nacian aŭ regionan lingvon por atingi celon, ekzemple laborado aŭ vojaĝado. Kaj Esperanto? Mi kredas, ke ni ofte lernas Esperanton, ĉar

ĝi vigligas ion en ni, kion neniu alia lingvo aŭ koncepto faras.

Ĉu Esperanto estas lingvo, kiu allogas ĉiujn homojn? Mi kredas ke jes! Sed ne eblas kredi ke ĉiuj homoj respondos same al iu ajn voko! Tial mi opinias, ke kvankam “la teorio de Zamenhof” celas ĉiujn, tiuj, kiuj respondas al ĝi estas mem-elektitaj personoj, por kiuj Esperanto ne estas nur lingvo; ĝi estas io, kion ili serĉas, eĉ nesciante ke ili ĝin serĉas, eĉ nesciante, ke ĝi ekzistas. Tio ne signifas, ke Esperanto ne povas havi praktikan valoron kaj utilon por la Eŭropa Unio kaj aliloke; male, esperantistoj devas serĉi praktikajn aplikojn por la lingvo. Tamen, mi kredas, ke la scipovantoj de Esperanto estas tiuj, kiuj decidis respondi al la voko kaj la celo. Inter tiuj homoj el diversaj landoj povas kreski, kaj ja kreskas, identeco, eĉ popoleco.

Erik Felker

Prokuroro en iu urbeto vokis sian unuan atestanton en proceso. Ŝi estis pliaghinta, avineca virino. Li ŝin demandis: “S-ino Jones, ĉu vi konas min?”

Respondis ŝi: “Jes, mi konas vin s-ro Williams. Mi konas vi ekde kiam vi estis tre juna knabo. Kaj honeste, al mi vi estas granda elreviĝo. Vi mensogas, vi estas virinĉasanto, vi manipulas homojn kaj sekrete priparolas ilin. Vi kredas, ke vi estas io, sed vi ne estas sufiĉe lerta por scii, ke vi neniam fariĝos io aŭ iu ajn. Jes, mi bone konas vin.”

La prokuroro silentis. Nesciante kion alian fari, li fingromontris trans la ĉambron demandante: “S-ino Williams, ĉu vi konas la defendantan advokaton?”

Refoje ŝi respondis: “Jes, ankaŭ lin mi bone konas. Mi konas lin ekde kiam ankaŭ li estis eta knabo. Mi vartis lin por liaj gepatroj. Kaj ankaŭ li estas granda elreviĝo al mi. Li estas mallaborema, antaŭjuĝema kaj drinkegema. Li ne povas normale rilati al iu ajn, kaj lia jurpraktiko estas la plej kanajla en la tuta ŝtato. Jes, ankaŭ lin mi bone, eĉ bonege konas.”

Tiam la juĝisto silentigis la ĉeestantojn en la juĝejo kaj vokis ambaŭ advokatojn al la juĝistejo. Tre mallaŭtvoĉe li diris minacante: “Se iu el vi demandos ŝin, ĉu ŝi konas min, mi enkarcerigos vin pro malestimo al la leĝo!”

EU-parlamentano esperas je Esperanto

Ljudmila Novak estas ano de la kristdemokrata grupo de la Eŭropa Parlamento, kaj mem en sia junaĝo studis Esperanton, kiun ŝi tamen ne plu aktive uzas. En 2007 ŝi partoprenis la 7an kongreson de Eŭropa Esperanto-Unio en Slovenujo.

Ŝia propono pri Esperanto estis prezentita la 21an de januaro, kiam la parlamenta komitato pri kulturo kaj edukado traktis raporton pri multlingveco. Laŭ ŝia amendopropono, al la raporto devus esti aldonitaj tri punktoj kun la jena enhavo:

...konstatas ke la principo de estimo de egalrajteco ne povs esti certigita dum oni uzas nacian lingvon (la anglan) kiel "lingua franca".

...proponas, ke konservante kaj uzante vivajn lingvojn, respektante lingvan diversecon kaj stimulante la lernadon de diversaj lingvoj oni pristudu la eblecon kaj utilecon de enkonduko de komuna artefarita lingvo en EU, ekzemple Esperanto. Nur ĝi povus faciligi interkompreniĝadon en Eŭropo kaj kun loĝantoj de aliaj kontinentoj, ĉar ĝi estas facile lernata kaj uzata.



...konstatas, ke la enkonduko de la eŭro kiel komuna eŭropa monunujo ege faciligis komercadon inter la ŝtatoj kaj helpis al ekonomia kreskado kaj pli granda stabileco en EU. Similajn efikojn povus havi ankaŭ la enkonduko de komuna komunikadlingvo, kiu ja neniel forigus aŭ limigus la uzadon de naciaj kaj aliaj vivaj lingvoj uzataj en EU.

Libera Folio: Kial vi decidis fari vian proponon pri Esperanto?

Ljudmila Novak: Ĉar kvankam oni lernas fremdajn lingvojn, la interkompreniĝado en EU estas malfacila. Ne estas juste, ke unu nacia lingvo (la angla) estu uzata kiel komuna lingvo.

L.F.: Kion vi opinias pri la nuna lingva politiko de la oficialaj EU-instancoj?

L.N.: - EU ege klopodas konsideri ĉiujn oficialajn lingvojn en EU kaj agas por fortigi la principon de plurlingveco.

Malgraŭ tio la plimulto de la dokumentoj, almenaŭ en la komenca fazo, estas en la angla aŭ la franca kaj tial aliaj lingvoj ne estas egalrajtaj.

L.F.: Kian rolon Esperanto, laŭ vi, povus havi en la oficialaj EU-instancoj, kaj pli vaste en EU?

L.N.: - Esperanto povus esti, samtempe gardante la naciajn lingvojn, komuna lingvo por komunikado inter ŝtatanoj de diversaj nacioj, precipe ĉar ĝi estas facila kaj ankaŭ lingve malpli talentaj civitanoj povus rapide lerni ĝin.

L.F.: Ĉu okazos diskuto pri via propono? Se jes, kiam? Kaj kiajn argumentojn vi tiukaze uzos en la diskuto kaj kian rezulton vi atendas?

L.N.: - La debato pri mia propono jam okazis en la Komitato por kulturo la 19an de januaro 2009. Nun mi ankoraŭ ne havas multajn subtenantojn. Mi deziris atentigi la komitatanojn kaj pensigi ilin pri tiu ĉi ebleco. Miaj amendoj estos malakceptitaj dum la voĉdonado, sed oni legos ilin kaj ilin pridiskutos en ĉiuj politikaj grupoj.

El Libera Folio

Ljudmila Novak alvokas ĉiujn subtenantojn de la propono esprimi sian apogon por ĝi en ŝia retejo.

Ĉu vi jam aŭdis pri la grafo, kiu en sia Rolls Royce-aŭtomobilo klinis sin al la ŝoforo dirante: "Veturigu en la abismon, Jakobo, mi deziras mortigi min!"?

